

Camaldoli
1-an de oktobro 2008-a

Kial JESUO

Enkonduko

Ekster la eklezio...

Kial elekti Jesuon?

La religia oferto estas hodiaŭ pli ampleksa ol iam ajn: ekde la tradiciaj religioj ĝis la novaj orientecemaj manieroj, ekde la propono de filozofiaj sistemoj ĝis la plej ekstravagancaj sektoj, ĉiuj pretaj certigi, gratifiki kaj ekzorci la ĉiamajn timojn. Ĉiuj certigas ke la akcepto de iliaj instruadoj, kaj la praktikado de la koncernaj normoj, kondukas al savo (en iu *paradizo* aŭ en iu *nirvano*), dum la malobeo kaj la malobservo estas severe punataj en tiu ĉi aŭ en la estonta vivo.

Ĉiu ajn religio havas kiel bazan aspekton la tri grandajn fundamentojn de la spiriteco: la *preĝadon*, la *almozon* kaj la *fastadon* (Mt 6,1-18), kaj la certecon (aŭ la pretendon) esti la ununura savovojo. Ĉiu religio prezentiĝas fakte kiel la vera, ekskludante ĉiujn aliajn, denuncatajn kiel falsajn aŭ verkojn de la demono.

Kiam la historiaj cirkonstancoj tion permesas, la nekredantoj estas devigataj aliĝi al la vera kredo. Se ili rezistas, ili estas eliminataj en la nomo de Dio, kaj la historio instruas ke neniam oni mortigas tiom ĝue samkiel kiam oni mortigas en la nomo de Dio, kies nomo estu *Javeo*, aŭ *Alaho*, aŭ *Sinjoro* estas neniu diferenco.

Oni povas demandi de si mem: en la religia panoramo tiuepoka (kaj ankaŭ en la nuna) kion nova alportis Jesuo, kiu ne jam estis dirita de aliaj grandaj saĝuloj kaj sanktuloj de la antikveco?

Kion nova instruis Jesuo kiu jam ne enestas en la Leĝo donita de Dio al Moseo, aŭ vortigita en la Sanktaj Librooj de la religioj?

Ne temas pri la koncepto de Dio-Patro: la koncepto de Dio kiel patro estas praa karakterizo de la homhistorio kaj komuna posedaĵo de la religioj, de Zeŭso, difinita de Homero “*patro de la homoj kaj de la dioj*” (Odiseado 1,28), al Javeo “*La Sinjoro, nia Dio, nia Patro*” (Tb 13,4).

Eĉ ne por la savo Jesuo ŝajnas proponi originalan vojon. Kiam oni demandas de li kio estas farenda por akiri la eternan vivon, Jesuo respondas ke ne al li oni devas sin adresi, ĉar jam Moseo indikis per la Ordonoj la vojon al la savo (“*Se vi deziras eniri en la vivon, observu la Ordonojn*”, Mt 19,17).

La novaĵo de la mesaĝo de Jesuo ankaŭ ne konsistas en la invito al amo, ĉeestanta en ĉiuj religioj, ekde tiuj paganaj ĝis tiu juda (Lv 19,18). Veras ke Jesuo malkroĉis la ampraktikon de la limigita kadro de la familia klano, ĝin malfermante ankaŭ al la malamikoj (Mt 5,43-48), sed ne tiu estas la originaleco de la “*bona*

novaĵo”. Kaj ĉiukaze neniu profeto iam ajn mortis pro invitado al la homoj ami unu la alian. La invito ne kontraŭstari la malbonulon kaj proponi “*la alian vangon*” (Mt 5,39) ne nur ne vekas alarmon en la potenculoj, sed ilin trankviligas. Eĉ la povohavantoj ĝojas kiam li aŭdas mesaĝon kiu invitas la personojn “*ne juĝi*” (Mt 7,1), “*ne kondamni*” (Lk 6,37) ne rezisti al perfortuloj (Mt 5,40-42).

Kial do elekti Jesuon?

Tiu demando, kial elekti Jesuon kaj ne iun alian, pasintec ne estis starigata. Kriston oni ne elektis, sed li estis trudata, sen alia alternativo ol la eterna damniĝo. Ja dum dekkvin jarcentoj fakte, la nediskutenda imperativo de la katolika Eklezio estis formulata per la efika kaj sinteza slogano “*Extra Ecclesiam nulla salus*”, fiksante aŭtoritatece ke “*ekster la eklezio ne ekzistas savo*”. Oni do ne elektadis ĉu esti kristanoj, oni estis devigataj al tio. La alternativo estis la infero.

Tiu teologio baziĝis sur unu el la tradukeroj de la Evangelio kiu plej influis negative en la konceptado de la Eklezio, kaj rilatas la versiklon 16 de la kapitulo 10 de la Evangelio laŭ Johano, konatan kiel la pecon de la “*Bona Paŝtisto*” (Jo 10,11-16).

Dum la polemiko kun la fariseoj kaj la religiaj estroj, Jesuo anoncas al ili:

Kaj aliajn ŝafojn mi havas, kiuj ne estas de ĉi tiu ŝafejo, ilin ankaŭ mi devas alkonduki, kaj ili aŭskultos mian voĉon kaj estos unu grego, unu paŝtisto (Jo 10,16).

La tradukinto, eble Jeronimo mem, konfuzis la vorton *ŝafejo* (gr. aulês) de la unua parto de la versiklo, kun la termino *grego* de la dua parto, kaj anstataŭ traduki la grekan *poimnê* (*grego*) per la latina *grex*, ĝin tradukis per *ŝafejo*, tiel ke ekestis:

“*Fiet unum ovile unus pastor*”

“*kaj estos unu grego, unu paŝtisto*”.

Dum la teksto de Johano indikis ke por Jesuo estis finita la epoko de la Ĉirkaŭbaritejoj, kiom ajn sanktaj ili povintus esti, kaj pro tio Kristo liberigis la Ŝafojn de la Ŝafejo por kunmeti unu nuran gregon, laŭ la latina traduko, Jesuo jes liberigis la Ŝafojn de la Ŝafejo de la judismo, sed por ilin poste enfermi en la ununuran kaj definitivan Ŝafejon: tiun de la katolika eklezio.

Surbaze de tiu instruo de sia Sinjoro, dum dek kvin jarcentoj la katolika eklezio kredis kaj pretendis, do, esti la ununura ŝafejo volita de Kristo, kaj en la jaro 1442-a, dum la Florenca Koncilio, ĝi dekretis: “la sanktega roma eklezio.. kredas firme... ke neniu ekster la katolika eklezio, nek paganoj, nek hebreoj, nek herezuloj aŭ skismoj partoprenos al la eterna vivo, sed tiu iros en la eternan fajron pretigitan por la diablo kaj liaj anĝeloj”.

Kaj la katolika eklezio, en la sekvaj kvin jarcentoj, konsideris damnitaj porĉiame ĉiujn kristanojn de la ortodoksaj kaj protestantaj eklezioj, kune kun la hebreoj, la muzulmanoj kaj la kredantoj de aliaj religioj: praktike tri kvaronoj el la homaro.

Nur en la pasinta jarcento, per la reveno al la origina greka teksto de la Nova Testamento, oni alvenis al pli bona kompreno de la instruo de Kristo kaj la Dua Vatikana Koncilio, en la jaro 1964-a, kvincent dudek du jarojn post tiu de Florenco,

deklaris ke Dio “*kiel savanto volas ke ĉiuj homoj estu savitaj (kp. 1 Tm 2,4). Fakte, tiuj kiuj senkulpaj ne konas la Evangelion de Kristo kaj lian Eklezion, kaj tamen serĉas sincere Dion, kaj per la helpo de la graco klopodas plenumi per siaj agoj la volon de Dio, konatan pere de la sugesto de la konscienco, tiuj povas akiri la eternan savon*” (Lumen Gentium, 16).

Per ĉi tiu solena deklaro, la Konkilio agnoskis ke la savo ekzistas ne nur ankaŭ en la aliaj kristanaj konfesioj kaj en la aliaj religioj, sed eĉ inter la nekredantoj kiuj aŭskultas propran konsciencon.

Kial Kristo

Ne plu povante pretendi la ekskluzivan superecon de la savo, la eklezio troviĝas nun en la situacio respondi al la demando: Kial Kristo?

Se ĝis la pasinta jarcento oni estis fakte devigataj esti baptitaj kristanoj kaj katolikoj, por sin savi, sen ajna alternativo, kiu ne estus la flamoj de la infero por la eterneco, nun la novaj generacioj scias ke ankaŭ en la hebreismo kaj en la islamismo, por citi nur la du religiojn ŝajne pli proksimajn al kristanismo, estas eble saviĝi.

Se do veras ke ĉiuj religioj kondukas al Dio, kaj do al la savo, kial oni devus elekti ĝuste Jesuon kaj lian sindevigan mesaĝon?

Kaj se eblas elekti, kiuj estas la kriterioj kiuj instigas preferi iun religion anstataŭ alian, se, je la fino, ĉiuj egalas?

La problemo ekestas hodiaŭ, ĉar, se ekde la unua duono de la pasinta jarcento ankoraŭ malofte oni renkontis kredantojn de aliaj religioj, nuntempe, la kulturaj kaj sociaj ŝanĝoj kaŭzas ke la infanoj, jam en la infanvartejo kaj en la elementaj lernejoj, troviĝas apud infanoj muzulmanaj, budhanaj, konfuceanaj, aŭ infanoj ne baptitaj.

Pro tio la demando “kial Kristo” kaj ne Moseo aŭ Mahometo, aŭ Budho, aŭ neniuj, atendas urĝan respondon.

Pro tio necesas koni kiu estas Jesuo, kion li reprezentis por siaj samtempuloj, kaj demandi de si mem ĉu povas ankoraŭ ion signifi, li kaj lia mesaĝo, hodiaŭ, du mil jarojn poste, por la homoj de nia jarcento.

“La savo-plano koncernas ankaŭ tiujn kiuj rekonas la Kreinton, kaj inter tiuj unuavice la muzulmanojn” (LG 16)

Kiu estis Jesuo

Danĝera homo

La ununuraj certaj informoj kiujn oni havas pri Jesuo, estas tiuj transdonitaj de la evangeliistoj kaj de la aliaj skriboj de la Nova Testamento.

Do, eĉ je supraĵa legado de la evangelioj, tuj reliefigas la danĝereco de Jesuo por liaj samtempuloj. Legante la evangeliojn, ne mirigas ke Jesuo estis murdita, sed surprizas kiel li sukcesis pretervivi tiom longe.

La donitaĵo kiu fakte elstaras jam ekde la unuaj paĝoj de la evangelioj estas ke Jesuo sukcesis eksplodigi kontraŭ si mortigan malamon tia ke ĝi sukcesis aliancigi fortojn inter si rivalajn kaj deturni de si la subtenon kaj la simpatiecon de la familio, de

la disĉiploj, de la tuta popolo, krom veki la kontraŭecon de la religia mondo. Situacio kiu estas majstre priskribita kaj resumita de Johano per la aserto: “*Li venis al siaj proprajoj, kaj liaj propruloj lin ne akceptis*” (Jo 1,11)

Mateo

Mateo, en sia evangelio, antaŭigas la klopodojn elimini la Mesion, ilin metante jam ĉe lia unua apero, per la ordono de reĝo Herodo ekstermi “*ĉiujn knabojn en Bet-Leĥem kaj en ĉiuj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, havantajn du jarojn aŭ malpli*” (Mt 2,16).

Marko

Jam en la tria ĉapitro de la evangelio laŭ Marko, aperas la decido liberiĝi je Jesuo.

Jesuo, por kiu la bono de la homo ĉiam pli gravas ol la honoro donenda al Dio, sanigis la homon kun la velkinta mano kvankam estis sabato, tago de la absoluta ripozo. La ĉeestantoj, anstataŭ ĝoji, ĉar Jesuo redonis sanon kaj dignon al kriplulo, reagis per mortiga furiozo: “*Kaj la Fariseoj eliris, kaj tuj konsiliĝis kun la Herodanoj kontraŭ li, kiamaniere lin pereigi*” (Mk 3,6).

Luko

En la evangelio laŭ Luko la klopodo mortigi Kriston aperas jam en la kvara ĉapitro. Jesuo, unuafoje predikas en la sinagogo de sia urbo, Nazareto, sed tio, kion li diras, ne vekas entuziasmon, male furiozon. La universala malfermiteco de la amo de Dio, eldirita de Jesuo, ne estis fakte favore akceptata de la nazaretanaj naciistoj: “*kaj ĉiuj en la sinagogo pleniĝis de kolero, aŭdante tion; kaj leviĝinte ili elĵetis lin ekster la urbon kaj kondukis lin ĝis la krutaĵo de la montetom sur kiu ilia urbo estis konstruita, por ĵeti lin malsupren.*” (Lk 4,28-29).

Johano

En tiu ĉi evangelio la decido elimini Jesuon estas prenata post la sanigo de la malsanulo en la baseno de Betesda: “Pro tio do la Judoj des pli celis mortigi lin, pro tio, ke li ne nur malobservis la sabaton, sed ankaŭ diris ke Dio estas lia propra Patro, kaj pretendis esti egala al Dio”. (Jo 5,18). La projekto de Dio, ke ĉiu homo iĝu lia filo (3), estas konsiderata de religiaj aŭtoritatuloj krimo eltranĉenda per la morto.

La kulpoj de Kristo

Laŭ Johano, por kapti Jesuon eksplodis senkompara polica operacio. Estas fakte utiligataj “*la kohortoj kaj militestroj kaj la oficistoj de la Judoj*” (Jo 18,3.12). La termino *kohorto* (gr. *speira*) indikas taĉmenton inter 600 kaj 1000 soldatoj sub la komando de la romia prokuroro por la tenado de la ordo en la urbo Jerusalemo. La gardistaro deĵoranta ĉe la templo de Jerusalemo, estis ĉirkaŭ ducent, en dependo de la ĉefsacerdoto por la sekureco de la Templo. Inter la du korpusoj estis profunda rivaleco kaj malamikeco, sed nun la du policaj korpusoj estas kuniĝintaj antaŭ la ununura danĝero.

Utiligi milon da armitaj homoj por kapti ununuran individuon, kiu interalie ne nur ne oponas reziston, sed mem sin transdonas, volas signifi ke tiu homo estas ege danĝera.

Kiu estis kaj kion faradis tiom danĝera tiu Galileano?

Liaj kreditleroj estas mizeraj. En la juda mondo la plej antikva dokumento kiu parolas pri Jesuo lin difinas: “*bastardo de adultulino*” (Yeb. M.4,13), ekzekutita “*ĉar li praktikis la sorĉarton, kaj forlogis kaj devojigis Israelon*” (Sanh. B. 434a).

3 “*Al tiuj kiuj lin akceptis li donis la eblon iĝi filoj de Dio (Jo, 1,12)*”

La situacio ne pliboniĝas en la evangelioj, el kiuj evicentiĝas ke la familianoj mem de Jesuo havas neniun konsideron pri tiu ilia stranga kaj embarasa parenco (“*ĉar liaj fratoj mem ne kredis al li*” Jo 7,5). Por ili li estas nur *frenezulo* forigenda el la cirkulado, ĉar li estas la honto de la familio: “*Kaj liaj amikoj, aŭdinte tion, eliris, por kapti lin, ĉar ili diris: Li frenezas*” (Mk 3,21).

La negativa prijuĝo de la familia klano de Jesuo estas abunde konfirmita

- de la **religiaj aŭtoritatuloj**, kiuj al la *frenezo* aldonas religian nuancon, la demoniĝon: “*Li havas demonon kaj estas freneza; kaj vi lin aŭskultas?*” (Jo 10,20; kp. 8,52; Mk9,30):

- de la **skribistoj**, oficialaj teologoj de la juda religia institucio, laŭ kiuj Jesuo estas “*blasfemisto*” (Mt 9,3) kaj, kiel tia, inda je la mortopuno. Por ili Jesuo agadas ĉar “*li havas Baal-Zebubon; per la estro de la demonoj li elpelas la demonojn*” (Mk 3,22).

- de la **ĉefpastroj** kaj de la **fariseoj**, laŭ kiuj Kristo “*estas trompisto*” (Mt 27,63);

- de la **homamaso**, laŭ kiu Jesuo estas iu kiu “*erarigas la amasojn*” (Jo 7,12)

- de liaj **sampatrujanoj mem**, laŭ kiuj Jesuo estis neniu alia ol “skandal-kialo”, kiuj rigardas skeptitaj kaj suspektmaj tiun Nazaretanon ekster ĉiu normo. Samlandanoj kiuj dirigas al Jesuo, perpleksa pro ilia nekredemo, tre amarajn vortojn: “*Profeto ne estas sen honoro, krom en sia patrujo kaj inter siaj parencoj kaj en sia domo*” (Mk 6,4).

Neniu sukcesis kompreni kiu estis Jesuo.

La novaĵo de li portata estis ekster la komprenkapablo de liaj samtempuloj, kiuj sukcesis vidi en li neniun alian ol la repliko de la personecoj de la pasinteco, kiel Elija, Jeremio, unu el la profetoj, aŭ Johano la Baptisto reviviĝinta (Mt 16,15; 14,2), ĝuste tiu Baptisto kiun Jesuo sukcesis seniluziigi. Fakte eĉ Johano la Baptisto, kiu ja rekonis en Jesuo la atendatan Mesion, konstatinte ke Kristo kondutas alimaniere ol la ekzekutisto kiun li estis anoncinta al la homamasoj (Mt 3,12; Lk 3,9), de la malliberejo sendas al li ultimatumon kiu sonas kiel malkonfesado: “*Ĉu vi estas la venonto, aŭ ĉu ni atendu alian?*” (Mt 11,3).

Homo soleca

En la evangelioj elstariĝas la soleco kiu akompanis la ekziston de Jesuo, tiu Kristo kiun “*liaj propruloj ne akceptis*” (Jo 1,11). Eĉ granda parto el liaj disĉiploj, koninte la programon de tiu Mesio, lin forlasis: “*Ĉe tio multaj el liaj disĉiploj iris*

retorne kaj lin ne plu akompanis” (Jo 6,66). Restis al li nur la Dekdu. Inter tiuj unu estas diablo (Jo 6,70), kaj inter la aliaj “*estas iuj, kiuj ne kredas*” (Jo 6,64).

Tiun solecon ekspluatos la estroj de la popolo, laŭ kiuj Jesuo estis publika danĝero kiun oni devis elimini kiel eble ple frue, antaŭ ol lia mesaĝo disvastiĝus inter la homamaso. “*Se ni lasos lin tiel, ĉiuj kredos al li*” (Jo 11,48), estas fakte la timigita komento de la ĉefpastroj, de la fariseoj, kaj de la tuta sinedrio, alarmitaj pro la fakto ke “*jen la mondo eliris post li*” (Jo 12,19).

Sed la estroj hezitis, ili “*timis la homamason*” kiu konsideris Jesuon profeto (Mt 21,46; Mk 12,12). Kiam fine la aŭtoritatuloj sukcesis lin kapti, Jesuo estos transdonita al Pilato, akuzita de la religiaj estroj esti krimulo (4), kaj forlasita de lia sama gento (“*Via propria nacio kaj la ĉefpastroj transdonis vin al mi*” (Jo 18,35).

Tio estas kompleta malsukceso por tiu Galileano konata de la homamasoj kiel “*manĝegulo kaj granda drinkanto*”, iu kiu ne frekventadis la personojn kiuj konvenis al la pretendata rolo de *Filo de Dio*, sed kiu estas konata pro tio ke li estas amiko de la feĉo de la socio, “*impotistoj kaj pekuloj*” (Mt 11,19), “*homamaso, kiu ne scias la leĝon, estas malbenita*” (Jo 7,49).

Kial tiom da rankoro ĉirkaŭ la personeco de Jesuo?

Kion li diris kaj faris tiom gravan por altiri al si samtempe suspektemon, kontraŭecon, mortigan koleron, kiuj lin kondukos al la plej kompleta soleco:

- rifuzata de la familio,
- forlasata de siaj disĉiploj,
- primokata de la religiaj aŭtoritatuloj,
- ridindigata de la romianoj,
- alnajlata al eŝafodo rezervita al la *malbenataj de Dio* (Dt 21,23; Gal.3/13)?

⁴ “*Se li ne estus malbonfaranto, ni ne transdonus lin al vi*” (Jo 18,30).

II

Jesuo ne estas kiel Dio...

Kiu estis, aŭ pli bone, kiu ne estis, tiu ĉarpentisto venanta el la misfama Nazareto de Galileo? (Jo 1,46).

Du difinoj de Jesuo, ĉiam ĉeestantaj en la evangelioj, helpas kompreni kiu li estis. Kristo estas difinita kiel *Filo de Dio* kaj *Filo de la homo*.

Jesuo estas Filo de Dio ĉar manifestiĝo de iu Dio en homa formo (Ef 2,7).

Jesuo estas Filo de la Homo, ĉar manifestiĝo de la homo en la pleneco de la dia kondiĉo (5).

Ambaŭ difinoj kompletigas kaj prezentas Jesuon kiel la Homo-Dion, videblan manifestiĝon de la nevidebla Dio.

Jesuo estas do filo de Dio kaj li mem Dio. Sed kiu Dio?

Por tion kompreni necesas ekzameni tion kion Johano, en la Prologo al sia evangelio, asertas:

Neniu iam vidis Dion; la solenaskita Filo, kiu estas en la sino de la Patro, Lin deklaris. (Jo,1,18).

La evangeliisto kontraŭdiras kion la Skribo mem, vorto de Dio, asertis.

Neniu, skribas Johano, iam vidis Dion.

Kaj tamen en la Biblio troviĝas klare asertita ke multaj rolantoj vidis la Sinjoron, kiel Moseo kun Aaron, Nabad, Abiu, kaj sep dek maljunuloj en la momento de la starigo de la interligo ĉe Sinajo, “*vidis la Dion de Israelo... kaj tamen ili manĝadis kaj trinkadis*” (Es 24,10-11; 33,11; Nm 12,6-8; Dt 34,10).

Per sia aserto, la evangeliisto relativigas la gravecon de tiuj spertoj: neniu iam ajn vidis Dion. Pro kio ĉiuj priskriboj de Dio kiuj estis faritaj, estas ĉiuj partaj, limigitaj kaj foje malveraj.

Nur Jesuo, la ununura filo, pro sia plena persona kaj intima sperto, povas riveli kaj konigi kio estas Dio. Pro tio necesas forgesi tion kion oni sciis pri Dio kaj male lerni de Jesuo, “*bildo de la nevidebla Dio*” (Kol. 1,15), kiu estas ĝia unika klarigo.

Oni ne devas starti de antaŭformita ideo pri Dio por fine konkludi ke Jesuo estas absolute egala al li. La deirpunkto ne estas Dio, sed Jesuo. Pro tio la evangeliisto invitas la leganton atenti la personon de Jesuo, ĉar nur en li eblas rekoni la veran vizaĝon de Dio, kiel sukcesos ĝin rekoni la apostolo Tomaso, per la plej alta kredokonfeso entenata en la evangelioj: “*Mia Sinjoro kaj mia Dio*” (Jo 20,28).

5 En la evangelioj *la Filo de la Homo* (*Ho huioŝ tou anthrōpou*) indikas tiun kiu agadas surtere kiel Dio mem (Mt 9,6), tiun, kiu igas ĉeestanta la diecon en la homa historio, kaj pro tio reprezentas la maksimumon de la homaro, la Homo en eminenta senco.

Tiu kreskoprocedo en la kompreno de la bildo de Jesuo, kaj de la pleneco de ĝia dieco, estis malrapida kaj nefacila. Malgraŭ ke de multe da tempo Jesuo restadis kun la disĉiploj, tiuj ankoraŭ ne sukcesis lin rekoni, kaj Filipo devas peti de Jesuo “*Sinjoro, montru al ni la Patron*” (Jo 14,8).

Jesuo respondas al li: “*Tiu, kiu vidis min, vidis ankaŭ la Patron*” (Jo 14,9). Jesuo invitas la disĉiplon eki de la sperto kiun li havas pri li kaj de tie alveni al la kono de la Patro: ne Jesuo estas egala al Dio, sed Dio egala al Jesuo.

Ĉiu ideo pri Dio kiu ne povas realiĝi en Jesuo estas eliminenda.

Ununura kriterio je kredebleco kiun Jesuo proponas per sia senkondiĉa aserto, estas la faroj “*Kredu al mi, ke mi estas en la Patro, kaj la Patro en mi; aŭ almenaŭ kredu al mi pro la faroj mem*” (Jo 14,11). Kaj la faroj de Jesuo estas ĉiuj agadoj adresataj al la homo por redoni al li la vivon, por lin pliriĉigi, por lin liberigi, donante al li dignon kaj liberon.

Per la vorto kaj la faroj, Jesuo proponas bildon de Dio kiu estas tute nekonata en la religia samtempa panoramo kaj signas la transiron el la *religio* (en la senco de tio kion la homo devas fari por Dio), al la *kredo* (tio kion Dio faras por la homo).

Jesuo, kiel *filo de la homo*, pleneco de la homaro, kaj kiel *filo de Dio*, videbla manifestiĝo de tiu Dio kiu “*neniu iam vidis*” (Jo 1,18), en la instruado kaj en la praktiko montriĝis kiel iu nekonata kaj nekutima Dio, konsterna kaj surpriziga. Iu Dio kiu povis esti nek komprenata, nek enmetita en la tradiciajn religiajn

parametrojn, iu Dio kiu sin metadis ekster ĉio kio povintus esti entenata en la vorto 'religio', iu Dio tute nova kiu, por esti komprenata, postulis kurso-ŝanĝon en la vivo de la kredanto, *konvertiĝon* kiu estos la antaŭkondiĉo por lin akcepti (Mk 1,15), kiel la nova vino postulas novajn felsakojn (Mt 9,17).

De la Leĝo de Dio al la Amo de la Patro.

Ekskludante ke iu ajn persono iam ajn vidis Dion (Jo 1,18), fakte Johano ekskludis ankaŭ Moseon. Eĉ Moseo ne vidis Dion, kaj do la leĝo kiun li transdonis ne povas reflekti la plenecon de la dia volo. Pro tio iĝis necesa ŝanĝo en la rilato inter Dio kaj la homoj, kiel anoncita pere de la profetoj (*Jen venos la tempo, diras la Eternulo, kiam Mi prisemos la domon de Izrael kaj la domon de Jehuda per semo de homo kaj semo de bruto*) (Jer 31,31; Ez 36,26). La nova interligo anoncita de Jeremio ne estos la obeo al iu leĝo fremda al la homo, sed la komuniko flanke de Dio de iu interna forto kiu permesos al la homo esti al li fidela: "*Mi metos Mian leĝon en ilian internon, kaj sur ilia koro.*" (Jer 31,33).

Kaj Jesuo, la homo-Dio, estis la ununura kiu povis ŝanĝi la rilatojn inter la homoj kaj la Patro. Kaj ĝuste referencante al la Patro, anstataŭ al la prapatroj, Jesuo povis distanciĝi de la juda religia kaj kultura mondo, en kiu li kreskis kaj estis edukata, kaj eki radikalan kaj neinvertigeblan ŝanĝon ne nur de la historio sed de ĉiu religia fenomeno, proponante novan interligon kun la Sinjoro, ne plu bazitan sur la obeo al la Leĝo de Dio, sed sur la akcepto de la amo de la Patro.

Kun Jesuo, Dio ne regas plu la homojn promulgante leĝojn kiujn ili devas observi, sed komunikante al ili sian memam amkapablon. Dum la amo estas iu realo ena en la homo, la Leĝo estos ĉiam kodo de ekstera konduto. Estas la amo kiu kreas kaj komunikas vivon, la Leĝo ne povas tion fari ("*La Leĝo fakte portis nenion al perfekteco*" Eb 7,19).

Por esprimi tiun profundan radikalan Ŝanĝon en la rilato kun Dio estis bezonata nova rilato (Interligo) kiu anstataŭu la antikvan:

Ĉar la leĝo estis donita per Moseo; la graco kaj la vero estiĝis per Jesuo Kristo (Jo 1,17).

Dum Moseo "servanto de Dio" (Ap 15,3), trudi al la popolo de Izraelo iun rilaton kun Yahvé, samkiel tiu inter servantoj kaj ilia Sinjoro ("*Vi servados Yahvé*", Es 23,25), Jesuo "*filo de Dio*" (Mk 1,1), inaŭguras novan rilaton inter iuj filoj kaj ilia Patro, bazita sur senĉesa amkomuniko: *Kiel la Patro min amis, tiel mi ankaŭ vin amis*" (Jo 15,9; 14,21.23).

Se la antikva interligo baziĝis sur la obeo al la dia leĝo, la nova pivotos ĉirkaŭ la akcepto kaj simileco al la amo de la Patro. Pro tio Jesuo neniam petos obeon al la siaj, kaj ankaŭ ne obeon al Dio, al liaj leĝoj (6). Al la obeo al Dio Jesuo kontraŭmetos la similecon kun la Patro, al la observado de la Leĝo la praktikadon de la amo. Dum la antikva interligo konkludiĝis per la imperativo "*Estu sanktaj*" (Lv 20,7), la nova malfermiĝas per la invito "*Estu kompatemaj*" (Lk 6,36). La sankteco de Dio estas neatingebla celo, la mizerikordo de la Patro estas ebla.

Ĉi tiu nova interligo inter la Patro kaj la homoj, proponata de Jesuo, estis tute nekonata en la religia tiuepoka panoramo, ĉar per ĝi ŝanĝiĝis radikale ne nur la koncepto de interligo sed ankaŭ la bildo de Dio.

La nova bildo proponata de Jesuo estas fakte tiu de iu Dio je la servo de la homoj (Mt 20,28; Mk 10,45; Lk 2,27; Jo 13,1-16), iu Dio kiu, anstataŭ forpreni, donacas kaj kiu, anstataŭ malgrandigi la homon, lin fortigas, iu Dio kiu anstataŭ esti ĵaluza pri la homa feliĉo, kunlaboras por ke tiu estu plena kaj plenplena (Jo 15,11).

En Jesuo, Dio manifestiĝas kiel tiu kiu estas je la servo de la homoj, kaj pro tio

- ne absorbas la homon, sed lin fortigas,
- ne petas, sed oferas,
- ne ekskludas, sed akceptas,
- ne punas, sed pardonas,

Iu Dio je la servo de la homoj

En ĉiu religio estis instruate ke la homo havis kiel ĉefan taskon la servadon al sia Dio (Dt 13,5): iu Dio prezentata kiel tre postulema reĝo, kiu daŭre postuladis al la homoj, forprenante iliajn aferojn (*“La plej bonon de la primicoj de la tero vi portos al la hejmo de Yahvé, via Dio”* Es 23,19), tempon (Es 20,8-11) kaj energiojn (Dt 6,5), per iu servado kiu estis donita precipe pere de la kulto.

La Dio kiun Jesuo konigis al siaj disĉiploj, ne kondutas kiel reĝo, sed kiel servanto de la homoj. Kun Jesuo ne plu estas la homo je la servo de Dio, sed Dio je la servo de la homoj, iu Dio kiu *“venis ne por esti servata, sed por servi”* (Mk 10,45; Mt 20,28).

6 La vorto *obeo* (gr. *ypakouô*) ĉeestas en la evangelioj nur 5 fojojn, sed neniam rilate al personoj: ĉiam al elementoj nocaj kaj kontraŭaj al la homo: vento kaj maro (Mt 8,27; Mk 4,41; Lk 8,25); malpuraj spiritoj (Mk 1,27), aŭ aĵoj: morusarbo (Lk 17,6).

La bildo de iu Dio je la servo de la homoj estas por Jesuo tiom grava ke, en la lasta vespermanĝo, post la donaco de si mem kiel viviga nutraĵo por la siaj (pano kaj vino), deklaras: *“mi estas meze de vi kiel la servanto”* (Lk 22,27).

La servado estas la agado kiu malkaŝas la identecon de Jesuo.

Renversante la logikon kaj la kutimon, Jesuo komparas Dion al iu mastro kiu, reveninte meze de la nokto de iu vojaĝo kaj, trovinte la servistoj ankoraŭ viglaj, anstataŭ sidiĝi ĉetabe kaj sin servigi, *“li sidigos ilin por manĝi kaj mem venos kaj servos al ili”* (Lk 12,37). Iu Dio kiu metas sian tutan amoforton je la dispoŝo de la homoj por ilin altigi al sia sama nivelo. Pro tio en la lasta vespermanĝo Jesuo *“la Sinjoro”*, plenumas la laboron de servisto, por ke la servistoj sin sentu sinjoroj (7) (Jo 13,1-17). Lavante la piedojn al la disĉiploj, Jesuo, la Homo-Dio, montras ke la vera grandeco ne konsistas en la dominado, sed en la servado de la aliaj. Jesuo, sin metante je la lasta loko, ne nur ne perdas la dignon, sed manifestas tiun veran, tiun dian: *“Mi, Javeo, estas la unua kaj mi mem estas kun la lastaj”* (Jes 41,4).

La kondiĉo de la homo en la rilato kun Dio, do, ne plu estas tiu de la servanto al lia Sinjoro, sed tiu de la filo en rilato kun iu Patro, kiu lin invitas atingi la dian kondiĉon. Kaj samkiel Jesuo ne estas servanto de Dio, sed *“filo de la Patro”* (2 Jo 1,3), tiel same tiuj kiuj aniĝas ne estos liaj servantoj (Jo 15,15), sed, estante filoj de la

sama Patro, fratoj kiuj kun li kaj kiel li estas vokataj kunlabori al projekto de Dio pri la homaro (Mt 28,10).

- ne absorbas, sed plifortigas.

En Jesuo, la Homo-Dio, manifestiĝas la pleneco de la amo de la Patro, iu Amo-Dio kiu ne estas rivalo de la homo, sed lia aliancano, kiu ne lin superregas, sed lin plifortigas, ne lin absorbas, sed sin proponas al la homo por komuniki al li la plenecon de lia dia vivo (*“la glorion kiun Vi donis al mi, mi donis al ili, por ke ili estu unu tiel same, kiel ni estas unu”* (Jo 17,22).

Estas Dio kiu prenas la iniciaton ami la homojn (*“Ne estas ni kiuj amis Dion, sed estas li kiu amis nin”* 1 Jo 4,10), kaj kun Jesuo *“Dio kun ni”* (Mt 1,23), Dion oni ne devas plu serĉi sed akcepti, kaj kun li kaj kiel li, iri direkte al la homoj.

7 Ĝi estas la sama koncepto eldirita de Paŭlo, en la dua Letero al la Korintanoj, en kiu li deklaras ke *“Jesuo Kristo, kiu, kvankam li estis riĉa, tamen pro vi li fariĝis malriĉa, por ke vi per lia malriĉeco fariĝu riĉaj”* (2 Kor 8,9).

Kun Jesuo la homo ne plu devas sin levi por fandiĝi kun sia Dio, sed akcepti iun Dion kiu malsupreniras por komuniki al la homo sian amon kaj fandiĝi en li (*“Se iu min amas, tiu observos mian vorton; kaj mia Patro lin amas; kaj ni venos al li kaj faros loĝon kun li”* (Jo 14,23), iu Dio kiu serĉas la homon por transdoni al li la plenecon de sia dieco (8). Iu Dio kiu, kiel la vitkulturisto kun la vitejo, kunlaboras al la sukceso de la vitejo, eliminante ĉion kio malpermesas la produktadon de fruktoj ĉiam pli abundaj (Jo 15,2). Kun Jesuo, la homo, templo de la Spirito, estas la ununura vera sanktejo de Dio *“ĉu vi ne scias, ke vi estas templo de Dio, kaj ke en vi loĝas la Spirito de Dio?”* (1 Kor 3,16; 2 Kor 6,19).

- li ne petas sed oferas

La nova vizaĝo de Dio proponata de Jesuo estas tiu de iu Patro kiu, anstataŭ forpreni, donacas, kiu ne malgrandigas la homon, sed lin fortigas. Iu Dio kiu *“ne loĝas en temploj konstruitaj de la manoj de la homo nek de la manoj de la homo lasas sin servi, kiel se li bezonus ion: estas li kiu donas al ĉiuj la vivon kaj la spiron kaj ĉion”* (At 17,24-25).

En la renkontiĝo kun la samariana virino, Jesuo manifestas la grandan novaĵon en la rilato kun Dio: la homo devas nenion oferi al Dio, sed akcepti iun Dion kiu sin oferas al la homo.

Pro tio al la samarianino, kiu deziris scii kien iri por oferi kultron al Dio (Jo 4, 19-20), Jesuo respondas ke estas Dio kiu sin oferas al ŝi, donacante al ŝi sian meman amkapablon (9).

La ununura kulto kiun Dio postulas ne adresiĝas al si, sed estas la praktiko de amo fidela al la homoj. Doni kultron al Patro estas kunlabori al lia kreiva agado komunikante vivon al la homoj.

Pro tio Dio ne petas oferojn al la personoj, sed estas li kiu iĝis ofero por sin donaci al la personoj: *“Mi volas la amon ne la oferon, la konon de Dio pli ol la holokaŭstojn”* (Hoŝ 6,6). La Dio de Jesuo ne forprenas la panon de la homoj, sed

estas tiu kiu iĝas pano por komuniki vivon al la homaro (*“Tiu estas mia korpo”*, Mt 26,26).

La kulto petata de la Leĝo de Moseo postulis de la homo la rezignon je difinitaj havaĵoj por ilin oferi al Dio (unuanaskitoj de brutaro, dekonaĵoj, ktp). Tio estis malpliigo de la homo, iu kulto de servantoj antaŭ iu reĝa Dio. La nova kulto proponata de Jesuo ne humiligas la homon, sed lin plifortigas, lin igante ĉiun fojon pli simila al la Patro. La antikva kulto substrekis la distancon inter Dio kaj la homoj, la nova celas ĝin forigi. La kulto al Dio estas nenio alia ol la vivo mem vivata favore al la alies bono. (Rm 12,1).

8 *“al ĉiuj kiuj lin akceptis, li donis la rajton fariĝi filoj de Dio”* (Jo 1,12).

9 *“Se vi scius la donacon de Dio, kaj kiu estas tiu, kiu diras al vi: Donu al mi trinki, vi petus lin, kaj li donus al vi vivan akvon”* (Jo 4,10).

Ĉar la amo estas la evolu-linio de la homo, tiu kreskado en la amo realigos en li la projekton de la kreinto, lin portante al ĉiun fojon pli granda simileco kun la Patro

- ne ekskludas, sed akceptas

Dum la religio prezentas iun Dion kiu diskriminacias inter merituloj kaj ne de lia amo, kaj rifuzas la pluvon al la pekintoj (Am 4,7; Jer 14, 110), Jesuo montras iun Patron *“kiu levas Sian sunon sur la malbonulojn kaj bonulojn, kaj sendas pluvon sur la justulojn kaj la maljustulojn”* (Mt 5,45). La komuneco kun Dio ne dependas de la meritoj kaj de la klopodoj de la homo, sed de la akcepto de iu amo kiu estas senpaga donaco, kaj kiel tia devas esti transdonata (Mt 10,8).

Neniu homo, kia ajn estas lia konduto morala aŭ religia, povas sin senti ekskludita de la amo de la Patro.

La Patro de Jesuo ekskludas neniun de sia amo, ĉar Dio ne rigardas la meritojn, aŭ la virtojn de la personoj, sed iliaj bezonoj kaj iliaj necesoj. Pri meritoj ne ĉiuj povas fieri, bezonojn ĉiuj havas. Inter la fariseo kiu laŭdis siajn virtojn kaj la impostisto kiu havis nenion alian montreblan ol sian mizeron, Dio preteratentas la senutilajn meritojn de la pia fariseo, kaj sentas sin nerezisteble altirita de la necesoj de la pekanta impostisto (Lk 18,9-14).

Kaj Jesuo, la “Dio kun ni” (Mt 1,23) irserĉadas la flankenmetitojn de la socio, por involvi ankaŭ ilin per la amo de la Patro. Jen kial li invitas lin sekvi la flankenmetitojn de Izraelo, kiaj estis la impostistoj kaj la pekantoj, personoj por kiuj estis neniu savo-espero. Sed la Sinjoro, kiu ne havas la mandaton prijuĝi la mondon, eĉ male ke tiu sin savu pere de li (Jo 3,17), *“venis por serĉi kaj savi la perditaĵon”* (Lk 19,10), kiel kuracisto sendita por kuraci kaj sanigi la malsanulojn (Mk 2,17).

Post komenca rezisto flanke de la disĉiploj de Jesuo, kompreni ke la amo de la Patro ne estas limigita al unu popolo, al unu religio, sed estas universala kaj adresiĝas al ĉiuj, la eklezio de la originoj, per la vortoj de Petro, esprimos tiun veron kiu estas la baza ŝtono de la kristana komunumo: *“Dio montris al mi ke oni devas diri profana aŭ malmorala al neniu homo”* (At 10,28).

Dio ne toleras ke en lia nomo oni povas diskriminacii personojn, al ĉiuj adresiĝas lia amo. Estas tiu la kialo pro kio Jesuo akceptas la malpuran leprulon (Mt 8,1-4) kaj la malmoralan virinon kiu havis sangofluon (Mt 5,25-29), la pardonitan pekulinon (Lk 7,36-50) kaj la impostiston (Mt 9,9), rolantojn reprezentajn de la flankenmetitaj de Izraelo, tiuj kiu povis eĉ ne pensi alproksimiĝi al Sinjoro, ĉar ili sciis ke tio estintus sakrilegio. Kiam ili kuraĝas tion fari, ili ricevas nek riproĉon nek rifuzon, sed kuraĝigon, kaj komprenas ke la vera sakrilegio estis ilia apartigo disde Dio: “*Via fido vin savis*” (Mk 5,34; Lk 7,50).

Tio kio je la okuloj de la religio estis konsiderata sakrilegio, por Jesuo estas fid-esprimo.

Sakrilegiuloj ne estas la pekuloj, sed la religiaj estroj kiuj ilin apartigas de Dio.

Skribistoj kaj fariseoj kredis ke la Regno de Dio malfruigis sian realigon pro la impostistoj kaj pekuloj. Efektive tiuj, kun Jesuo, estas jam ĉe la tablo de la Regno, kiel atentigos Mateo en sia evangelio: “*la impostistoj kaj malĉastistinoj iras antaŭ vi en la regnon de Dio*” (Mt 21,31-32).

La akcepto de la amo de la Patro estas antaŭata de lia senkondiĉa pardono.

- ne punas, sed pardonas

En la psalmo 139, la pia psalmisto eksklamas: “*Ha, se Dio mortigus ĉiujn pekulojn!*” (v. 19) kaj la Sirakido plipezigas la aferon: “*La Plejaltulo malamas la pekulojn*” (Sir 12,6).

La sinteno de Jesuo rilate tiujn kiuj estis konsiderataj pekuloj estas malsama, li ilin ne malproksimigas, sed proksimigas, ilin ne minacas, sed komunikas al ili amon. Jesuo ne neas la pekon, kiun li difinas kiel malsanon kiu malpermesas al la homo esti tute integra (10), sed li rifuzas la ideon kiu vidas en la pekulo iun infektiton kiun oni devas eviti: por la Sinjoro li estas malsanulo kiun oni devas sanigi.

Pro tio la Dio kiu manifestiĝas en Jesuo ne nur ne forprenas la vivon al pekuloj, sed komunikas al ili la sian.

Laŭ la religio, la pekulo devas penti pri siaj kulpoj, peti pardonon, proponi riparan oferon kaj poste ricevi la pardonon por esti digna alproksimiĝi al la Sinjoro.

10 Laŭ la dua Vatikana Koncilio, “La peko estas malpliigo por la homo mem, malpermesante al li akiri propran plenecon (Gaudium et spes, 13).

Sed kun Jesuo, la pardono de Dio estas donata antaŭ la pento de la pekulo, kiel bone komprenita kaj eldirita de Paŭlo en la Letero al la Romanoj: “*Dio rekomendas al ni Sian amon en tio, ke dum ni ankoraŭ estis pekuloj, Kristo mortis por ni*”. (Rm 5,8).

Por Jesuo ne estas necese ke la malpura pekulo purigu sin por esti digna akcepti la Sinjoron, sed estas la akcepto de la Sinjoro kiu igas lin pura.

Jesuo, videbla manifestiĝo de la amo de Dio, ne donas sin kiel premion por la bona konduto de la “sanuloj” sed oferas sin kiel viviga forto por la “malsanuloj” (Mk 2,17).

Lia pano ne estas premio, sed donaco.

La premio estas rekompenco kiu dependas de la kapabloj (meritoj) de la ricevanto, la donaco dependas de la malavareco de la donacanto. La Sinjoro ne rekompencas, li donacas (Mt 20,15).

Tio estis, tio estas, kaj tio estos porĉiame “*Jesuo de Nazareto, kiu iradis bonfarante kaj resanigante ĉiujn kiujn estis sub la rego de la diablo, ĉar Dio estis kun li*” (Ag 10,38).

Tiu estas la *bona novaĵo*, anoncita kaj travivita de Kristo, kiu povas ankoraŭ esti re proponata al viroj kaj virinoj kiuj sopiras al la pleneco de ilia ekzisto, kaj trovas en Jesuo, nur en Jesuo, la respondon al iliaj atendoj. “*Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos*”. (Mt 11,28).